

Ĉu UFE Bone Plenumas sian Taskon ?

— Reago al Publika Letero de André Frangeul —

FRANCIA MOVADO

Opinio verkita la 22^{an} de Marto 2007

FINE de Februaro 2007 mi ricevis publikan leteron de s^{ro} **André Frangeul**, kiu estas sekretario de la Franca Centrokcidenta Esperanto-Federacio kaj prezidanto de la Anĝeva Esperanto-Asocio. Lia letero de la 15^a de Februaro 2007 temas « **pri *Espéranto-France* ¹ : ĉu nia nacia Esperanto-asocio bone plenumas sian taskon ?** » ²

Unue mi dankas kaj gratulas al André Frangeul pro lia esprimo, ĉar laŭ mi ĉiu debato ebligas konsciigi kaj pripensigi nin pri iuj demandoj kaj iel progresigi nian aferon. Krome kiel federacia prezidanto mi ĉiam ŝatas, ke aliaj federaciestroj vortigas siajn pensojn pri nia landa Esperanto-movado. Tio kontribuas al ĝenerala, interregiona, tutlanda diskuto, kiu nur bona povas esti.

Konforme al lia peto fine de la letero, mi jene respondu al li kaj esprimu miajn opiniojn pri liaj menciitaj temoj : membriĝoj al UFE, neceso de 1^o ĉiujara kampanjo far UFE, 2^o rebatservo kaj komunikado de UFE, 3^o komitato de la Esperanto-amikoj kaj 4^o subteno al la staĝaj Esperanto-centroj.

Individuaj membriĝoj al la landa asocio

André Frangeul skribis : « *El la lokaj esperanto-centroj, multaj aktivaj esperantistoj ne sentas la bezonon aliĝi al nacia organizaĵo kaj tiel kontribui al la progresoj de Esperanto naciskale. [...] Kial aliĝi al asocio, kiu [...] ŝajnas [...] tute inerta ?* »

Estas prave, ke ni lokaskale tre ofte renkontas tiun inklinon ne membriĝi al la landa asocio. Bedaŭrinde, ĉar landaj membriĝoj farus UFE'n pli ampleksa kaj konsiderinda laŭ rigardo de eksteruloj kaj oficialuloj. Kaj bedaŭrinde, ĉar UFE kaj ĝiaj diversaj instancoj ja agas sur pluraj landaj kampoj : komunikado kaj informado (retejoj, revuo, varbiloj, budaj kakemonoj, ktp.), rilatoj al politikularo kaj al neesperantistaj instancoj aŭ asocioj, helpo al larĝ-skalaj aranĝoj...

Problemo kuŝas en la maltroa diskonigo de tiuj faroj ; sekve oni miskonkludas, ke nenio fariĝas lande. Mi rimarkigu, ke tiajn rimarkojn pluraj faras ankaŭ pri federacioj. Sed tion ni neniam aŭdas pri kluboj. Tute simple ĉar la surlokaj agadoj de la kluboj estas tuj videblaj de ĉiuj : kursoj, prelegoj, ekspozicioj, budoj, ktp. Tiuj regulaj agadoj konsistigas la agosferon de la kluboj, kaj estas la plej facile konstateblaj pro la surlokeco.

1. *Espéranto-France* : franca nomo de la Unuiĝo Franca por Esperanto (UFE).

2. La tuta publika letero de André Frangeul estas legebla fine de tiu ĉi dokumento.

Sed oni ne postulu, ke la federacioj kaj UFE agu same kiel la kluboj. Al ĉiu asocia tavolo respondas specifa agosfero ! La kluboj zorgas pri surlokaj aferoj. Sed siaflanke UFE zorgas pri tutlanda kunordigado kaj pri specife landaj aferoj (rilatoj al ministrejo, al landaj neesperantistaj asocioj, francaj varbiloj...). Dum la federacioj estas perantoj inter la kluboj kaj UFE, kunordigas lokajn agadojn kaj zorgas pri regionalkaj aferoj (ekz. regionaj ekzamensesioj).

Kaj evidente kampanjoj al politikularo, eldono de varbiloj kaj informiloj, monhelpo al aranĝoj aŭ kursoj... ne estas tiel videblaj kaj konataj kiel la klubaj agadoj. Sed nekonateco neniel estas nefarateco. Ĉiuj asocioj agas kaj strebas je ĉiuj teritoriaj tavoloj kaj en siaj respektivaj agosferoj, kaj ĉiuj bezonas membrojn por plu vivi kaj plu agadi. Tial estas vere dezirinde, ke la homoj unue pli interesiĝu pri la regionaj kaj landaj faroj kaj due partoprenu per membriĝo kaj eĉ aktivado !

Ĉiujara tutlanda kampanjo al specifa publiko

André Frangeul skribis : « *Ĉiujare, en septembro-oktobro, Esperanto-France impulsu nacie kampanjon por la informado en definitiva medio : edukistoj, studentoj, universitatoj, liceoj, turismo, gazetaro, ktp.* »

La ideo kompreneble bonas ! Informaj kampanjoj ja necesas en ĉiuj medioj kaj tavoloj de nia socio. Kaj tia naciskala kampanjo koncentrita sur unu aparta medio ŝajnas tre interesa. Adresi sin al unu specifa publiko dum momento de la jaro kaj tra la tuta Francio povus havi pli grandan eĥon ĉe tiu publiko.

La problemo estas la homfortoj. Necesus tutlandaj kunordigado, konsilado kaj kunfarado... kio ne plej facilas. Kaj necesas ankaŭ la plena partopreno de ĉiuj federacioj por realigi la kampanjon siaregione. Sed bedaŭrinde oni konstatas, ke nur malmultaj federacioj tiel agis kune kun UFE kadre de la ĝisnunaj tutlandaj kampanjoj. Jen pro manko de volo, jen pro manko de homfortoj, jen pro manko de scio... Estu unuflanke atenta kunordigado kaj helpo far UFE kaj aliflanke pretiĝo de la federacioj kaj kluboj.

Rebatservo de UFE

André Frangeul skribis : « *Kelkafoje, aperas (ĉefe en la nacia gazetaro) aŭ estas aŭdataj en televido, stultaj asertoj pri esperanto. Esperantistoj ofte bone reagis, ĉefe per Internet, sed estus dezirinde ke Esperanto-France "oficiale" intervenu.* »

Sinjoro Frangeul denove pravas pri la neceso de landa rebatservo en UFE por reagi pri landaj gazet-artikoloj kaj televidelsendoj. Ankaŭ en ĉiu federacio necesus rebatservo por reagi pri regionaj gazetartikoloj. Tie kuŝas du problemoj. Unue, refoje la manko de homfortoj : rebati postulas tempon kaj energion. Due, la ofta manko de kompetento : rebati ja postulas ankaŭ kapablon trafe kaj dece kontraŭargumenti, kio ne estas facila afero.

Tial necesas formadoj, preparadoj pri rebatado. Ekzemple, estus profite por ĉiuj, ke UFE organizu seminariojn pri rebatado, same kiel GEE³ lastatempe organizis seminarion pri instruado. Kaj nepre estu konsiloj kaj direktivoj de UFE pri argumentado, por ke la diversaj rebatoj (landaj, regionaj kaj lokaj) fariĝu en homogeno. Ĉar tro ofte oni konstatas disajn, individuajn reagojn, kiuj fuŝargumentas kaj eĉ povas malutili. Resume, necesas kompetento kaj homogeno — al tio ni strebu.

Komunikado : varbiloj, informiloj kaj bulteno

André Frangeul skribis : « *Ni notu pozitivajn punktojn : [...] panelojn [...] faldfoliojn [...] DVD [...]. [...] La revuo "Le Monde de l'Esperanto" estas bela dulingva gazeto [...]. Ĝi devus aperi pli regule kaj iom pli ofte. La monata bulteno "Okazas" ankaŭ mankas al ni.* »

Pri la eldonataj varbiloj kaj informiloj ni povas nur konsenti. Vere okazis tre granda progreso de la Esperanto-varbiloj danke al la novaj teknikoj kaj al la kompetenteco de la responsuloj aŭ komisiitoj de UFE kaj aliaj. Same pri la franca revuo *Le Monde de l'espéranto*, kiu ja suferas malakuratemon sed estas bela, agraba kaj montrinda. Pri la ofteco : idealo estus ĉiumonata eldono de la revuo, sed tio ne eblas pro (denove) la manko de homfortoj kaj verŝajne ankaŭ la kosto por la asocio ; la nuna principa eldonofteco taŭgas laŭ mi.

Sinjoro Frangeul mencias la informilon *Okazas*, kiu trapasis reformon en 2006. Ĝi celas informi pri la intaj kaj ontaj okazaĵoj en la regionaj kaj lokaj Esperanto-movadoj, kio ebligas diskonigon de siaj agadoj kaj ekscion pri tiuj de la aliaj kluboj. Antaŭe ĝi aperis aparte de *Le Monde de l'espéranto*, kvarpaĝe kaj ĉiumonate. Hodiaŭ ĝi aperas kun kaj en *Le Monde de l'espéranto*, do malpli ofte. La nova formo pli belas, tamen ankaŭ mi preferus retrovi antaŭajn karakterizojn de *Okazas* — precipe la oftecon.

Ĉar nuntempe estas malpli facile aperi siajn informojn en la informilo. Tion kaŭzas du faktoj. Unue, la loko dediĉita al la klubaj informoj estas iomete malpli vasta ol antaŭe : aldoniĝis en la informilo plenpaĝa artikolo por konsili aktivulojn (ĉiam tre interesa) kaj la internacia kalendaro. Due, la informilo eldoniĝas ja malpli ofte. Tiel ke, de la malnova stato

al la nova, la nombro da lokaj informoj duoniĝis (eĉ iom pli).

Sekve mi sugestus la jenon : ree eldoni la informilon *Okazas* aparte de *Le Monde de l'espéranto* kaj ĉiumonate. Povus problemi la ĉiumonata verko de plenpaĝa artikolo por konsilado : tiun artikolon oni povus meti en *Le Monde de l'espéranto* apud la aliaj artikoloj. Estas vera deziro de la kluboj kaj federacioj diskonigi siajn agadojn tra la lando. Ni devus diskuti pri la afero kaj la diversaj ebloj.

Komitato de la Esperanto-amikoj

André Frangeul skribis : « *Ni vere bezonus en Francio, komitaton de amikoj de esperanto, kiu kunigus konatajn personojn de la politika, arta, ĵurnalista, scienca, edukatista medioj !* »

Pri tiu ideo mi pli skeptikas. Kompreneble la ideo estas bona. Sed praktike, kiel starigi kaj konsistigi tian komitaton ? kiel vivteni ĝin ? La afero meritas pripenson kaj diskuton.

Subteno al la staĝaj Esperanto-centroj

André Frangeul skribis : « *Estus bone se Esperanto-France, en tuta kunlaborado pli aktive kun la aliaj naciaj esperantaj organizaĵoj, konsiderus tre serioze la gravecon de niaj studaj instalaĵoj kiel Grésillon kaj Bouresse, por vivteni ilin kaj ampleksigi ilian rolon.* »

Pri tiu afero mi ne sufiĉe scias kaj konsekvence ne kompetentas. Mi fakte konscias, ke malmulton mi scias pri la Esperanto-centroj en Grésillon, Bouresse k.a. Kiel ili organiziĝas ? kiuj bezonoj estas iliaj ? kiel kaj por kio ampleksigi ilian rolon ? Kulturaj kaj studaj centroj ja gravas. Necesas informiĝi kaj diskuti pri tio.

**

Ĉu nia landa Esperanto-asocio bone plenumas sian taskon ? Certe estas mankoj, precipe homfortaj, ankaŭ komunikaj kaj rilataj. Certe estu plibonigoj, ekzemple pri rebatado, informado kaj kunordigado. Sed estas ankaŭ rimarkindaj faroj, inkluzive la revuon kaj la varbilojn.

Ĉu UFE kontentige agadas ? Vere, ni rigardu al ĉiuj asocioj, landa, regionaj kaj lokaj. Ĉar neniun tavolo povas sola progresigi Esperanton ; ĉiu tavolo kaj agadu siaflanke kaj kunagadu kun la ceteraj du tavoloj. Tio estas nepra neceso.

Sinjoro Frangeul petas, ke UFE estu pli atakema (« *ofensivema* ») en la defendo kaj konigo de Esperanto. Por esti pli efikaj kaj progresigi Esperanton, niaj asociaj tavoloj pli regule interriltu, pli intime kunlaboru, kaj pli homogene agadu. Tiel ni igos nian tutlandan movadon pli fortika. Tiel ĉiuj ni pli efike plenumos niajn taskojn. ■

3. GEE : *Groupe des enseignants espérantophones*, asocio de la francaj Esperanto-instruantoj.

Publika Letero de Sinjoro André Frangeul

Pri Esperanto-France Ĉu nia nacia Esperanto-asocio bone plenumas sian taskon ?

En la lokaj esperanto-centroj, multaj aktivaj esperantistoj ne sentas la bezonon aliĝi al nacia organizaĵo kaj tiel kontribui al la progresoj de Esperanto naciskale.

Eble, ili pensas : kial aliĝi al asocio, kiu, krom la preno de kotizoj, ŝajnas, el ekstere, tute inerta ?

Efektive, Esperanto-France, povus esti multe pli ofensivema en la lukto por la defendo kaj la konigo de esperanto. Jen kelkaj sugestoj :

1^e — Estus dezirinde ke, ĉiujare, en septembro–oktobro, Esperanto-France impulsu nacie kampanjon por la informado en definitiva medio : edukistoj, studentoj, universitatoj, liceoj, turismo, gazetaro, ktp.

Esperanto-France, ekzemple, konsilus klopodojn kaj preparus tekstojn por trafi la koncernatan medion.

2^e — Kelkafoje, aperas (ĉefe en la nacia gazetaro) aŭ estas aŭdataj en televido, stultaj asertoj pri esperanto.

Esperantistoj ofte bone reagis, ĉefe per Internet, sed estus dezirinde ke Esperanto-France « oficiale » intervenu.

Ni ne devas forgesi ke se ĵurnalisto mokus, ekzemple, la bretonan aŭ la vaskan lingvon, la koncernataj regionaj asocioj vigle reagis. Nia lingvo esperanto meritas absolute la saman agadon.

Iam, en nia movado, oni parolis pri la « paperkanono » !

Ni notu pozitivajn punktojn :

- La panelojn proponitajn de Esperanto-France.
- La bonegan faldfolion « Esperanto la langue équitable ».
- La DVD « Esperanto elektronike » (por komputiloj).

Aliflanke, la revuo « Le Monde de l'Esperanto » estas bela dulingva gazeto, kiun ni povas fiera prezenti al la publiko.

Ĝi devus aperi pli regule kaj iom pli ofte. La monata bulteno « Okazas » ankaŭ mankas al ni.

3^e — Ni vere bezonus en Francio, komitaton de amikoj de esperanto, kiu kunigus konatajn personojn de la politika, arta, ĵurnalista, scienca, edukatista medioj !

Ne nur ni povus citi iliajn nomojn sed tiuj personoj, regule informitaj pri la gravaj okazaĵoj en nia movado, eble kelkafoje utilis por interveni favore al esperanto.

4^e — Mi opinias ke estus bone se Esperanto-France, en tuta kunlaborado pli aktive kun la aliaj naciaj esperantaj organizaĵoj, konsiderus tre serioze la gravecon de niaj studaj instalaĵoj kiel Grésillon kaj Bouresse, por vivteni ilin kaj ampleksigi ilian rolon.

Mi estus feliĉa se, kiel mi, vi esprimus opinion pri tiuj temoj.

ANDRÉ FRANGEUL
(Angers) 15/02/2007